



Studsabatoj en CDELI

Malkovro kaj studo de esperanto

*Por plenumi la bezonon praktiki la lingvon sub la gvido de atentaj pedagogo, la **Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)**, fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, regule organizas studsabatojn, malfermitaj por ĉiuj. Ili estis organizitaj de Claude Gacond dum jardekoj, nuntempe gvidataj de Mónica Molnár, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller, Nicole Margot, kunlabore de Danielle Carrier.*

Datoj de la venontaj sabatoj

2017: septembro 23, oktobro 21, novembro 18, decembro 16.

3 studgrupoj: tutkomencantoj, progresantoj, supera nivelo.

Kosto

Po 15.- svisaj frankoj por studsabato (senpage por studentoj).

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la renkontiĝoj la partoprenantoj anoncu sin ĝis la antaŭa mardo, indikante siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron.

Retadreso: esperanto@cdeli.org - Telefono : 021 728 31 27 (kun respondilo)

Horaro de la sabatoj

10.00 : Malfermo de la salono de CDELI :

Eblas aĉeti novajn librojn : lernolibrojn, vortarojn, beletraĵojn, ktp, kaj tre malkostajn brokantaĵojn.

10.20 : Oficiala malfermo kaj formo de la studgrupoj.

10.30 : Unua studperiodo. Ĝenerale oni laboras en la salono de CDELI kaj en apudaj salonoj, kiujn la lernejo disponigas al ni.

11.30: Kafo-paŭzo.

11.45 : Dua studperiodo.

12.45 : Paŭzo por kune tagmanĝi en proksima restoracio. Ĉiu surloke pagas sian manĝon.

14.15 : Tria studperiodo.

15.15 : Te-paŭzo.

15.30 : Kvara studperiodo.

16.30 : Konkludo de la renkontiĝo en la salono de CDELI, kie eblas resti por babili teumante, kaj por aĉeti librojn, ĝis sia propra forirhor.

17.30 : Oficiala fermo.

CDELI-enirejo: Centra pordo norde de la domo de la Biblioteko (Progrès 33). Se la pordo estas fermita, sonorigu (CDELI-sonorilo) : iu venos malfermi. Supreniru ĝis la 2a etaĝo.

Por atingi la Bibliotekon

La Biblioteko troviĝas ĉe la numero 33 de la strato Progrès. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buso 304, direkto "Hôpital", 3-a haltejo: "Bibliothèque". Aŭtomobilistoj sekvu la ŝildojn vojmontrantajn "Bibliothèque". Bonvolu parki en la stratoj de la kvartalo, ne en la korto.

Ni ĝojos vin renkonti kaj helpi vin praktiki Esperanton.

Monika Molnar, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller, Nicole Margot, Danielle Carrier.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Svisa ILEI-Sekcio (SIS)

CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds (NE), Suisse. Tél. +41 32 967 68 42
www.cdeli.org/cours | [Studsabatoj](#) | [Samedis d'étude](#) | [Studiensamstage](#) | www.lernu.net

Eldono: 2017 julio 03 /stk